
# Plor-ĉesiga kanto






Kuras kato rapide,
ĉar ĝin hundo kurigas.
Estas puraj la ŝuoj,
ĉar mi ilin purigas.



Ploras tiu knabino –
ĉar ŝin knabo plorigas.
Estos klara la tasko –
ĝin patrino klarigas.



Belan foton mi vidas
vi ĝin al mi vidigas –
Fidas mi vin, amiko,
ĉar min agoj fidigas.



Belan libron mi vidas
vi ĝin al mi vidigas –
Fidas mi vin, amiko,
viaj agoj fidigas.



Havas panon, mi havas
nur ĉar vi ĝin havigas.
Pasas tempo ĝi pasas
nur ĉar mi ĝin … pasigas.

**Solfeĝaj notoj de tre simpla melodio:**

mi mi la la sol la la
sol fa mi re do mi mi
sol fa mi re do mi re
la la sol sol sol la la (subaj, en la lasta verso)